SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET
SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO
TEGELBACKEN, STOCKHOLM
TEL. 200043 - POSTGIRO 2012

Al la tutmonda esperantistaro.

La olimpaj ludoj en Londono 28 julio - 9 aŭgusto altiras al si la intereson de la tuta mondo. Senkompara lingva konfuzo jam dum semajnoj antaŭ la ludoj karakterizos la vivon en Londono. Al la internacia esperantomovado proponas sin unika okazo pruvi al la reprezentantoj de la sporto tutmonda la uzeblecon de esperanto kiel internacia helplingvo.

La Sveda Esperanto-Federacio proponas, ke ĉiuj esperantoorganizoj kiel eble plej frue publikigu la artikolon ĉisuban en siaj esperantogazetoj kaj traduku ĝin en siajn naciajn lingvojn por aperigo en plejeble granda nombro da tagaj ĵurnaloj, sportaj gazetoj kaj fakaj organoj. Ni petas vin sendi du ekzemplerojn de la publikigintaj gazetoj al ni. Skribu klare (preslitere) la nomon, eldonlokon kaj landon de la gazeto kaj nomon kaj organizon de la tradukinto. La eltrančoj kaj gazetoj estos uzataj kiel materialo por ekspozicio dum la olimpaj ludoj.

Jen la teksto por publikigo:

- - - - - - - -

Konkurso pri sporta verkaĵo.

La oficiala organo de la brita olimpa komitato, Worl Sport, aranĝis konkurson, kies objekto estas verko de artikolo pri temo: "Kiel internacia interkompreno kaj amikeco estas akcelataj per la sporto". La verkintoj de la plej bonaj kontribuoj estos premiataj per senpaga restado en Londono dum la olimpiado, estante de la 28-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto la gastoj de World Sport. Apartaj lokoj estos rezerv-

itaj por ili en Wembley kaj ili estos ĉiel pri-organtaj dum la restado.

Ni sciiĝis, ke sveda sporta pedagogo en la kadro de tiu konkurso ~~iniciatis projektaron pri sportaj konkursoj~~ inter la junuloj de la tuta mondo, okazontaj dum aparta "Tutmonda sporta tago", ~~kaj donis detalan plan~~non pri la aranĝo de tiaj konkursoj.

Se oni deziras kapti grandiozajn arojn da partoprenantoj devas esti plenumataj la jenaj kondiĉoj:

la konkursoj okazu en la hejmloko,

koncernu limigitan nombron da simplaj sportaj branĉoj,

ebligu kiel eble plej justan taksadon de la rezultatoj. Por tia taksado la proponinto ellaboris poentan tabelon.

La "Tutmonda sporta tago" devas laŭ la propono esti aranĝata de UN. La venkintoj ricevu diplomon en esperanto, subskribitan de la regnestroj de la landoj reprezentataj en la konkursoj.

La verkinto montras en sia propono, ke la realigo de tiaj internaciaj konkursoj postulas forigon de unu obstaklo: la lingva diverseco. Tiun obstaklon superas nur unu alia faktoro: la manko de volo de la homoj uzi la lingvon de alia nacio en internacia kunlaboro.

Sed tiu obstaklo malaperos en tiu momento, kiam akceptos la projektita "sporta komitato", laboranta sub la egido de UN, esperanton kiel oficialan lingvon por internaciaj sportaj interrilatoj. Ne nur teorie, sed ankaŭ praktike la internacia esperantomovado montriĝis la plej efika porpaca organizo de la mondo. Se la internacia sportmovado povos efike sin servi de la mondlingva movado, oni gajnos multe pli grandan profiton por la tutmonda paco ol sukcesis atingi ĝisnunaj pac-kongresoj. Nur la sporta movado tiam montros sin potenca faktoro por la akcelo de internacia interkompreno kaj amikeco inter la junuloj de ĉiuj landoj, al kiuj paco sur la tero devas aperi la plejakirindaĵo de la vivo.